


Bulgara **ESPERANTISTO**



12

1969

	Paĝo
Nikola Aleksiev. Larĝaj perspektivoj dum la Nova Jaro	1
Ifja Ŝkapa. Novaj nekonataj materialoj pri Maksim Gorkij kaj Esperanto	3
Jordan Atanasov. Pejo K. Javorov	6
Pejo K. Javorov. Belegaj du okuloj. Trad. Asen Grigorov	6
Ekzilitoj. Trad. St. Kiraĝiev	7
A. Krilov. Ezoko kaj kato. Trad L. Miĥajlov	7
Liljana Stefanova. La „Râcenico“ ploris. Trad. R. Georgieva	8
* * * Pluraj Esperanto-kursoj en la lando	10
Todor Kiracov. Esperanto-ekspozicio en V. Târnovo	11
* * * Pola kultura centro aranĝos E-ekspozicion	11
Ĵeko Zaprjanov. Renkontiĝo de esperantistoj	11
* * * Novaĵoj el la kongreslando	12
* * * Novaĵoj el Pollando	13
* * * Bronza Zamenhof-tabulo en Bad Kissingen	13
* * * Letero de veterano el Sovetunio	14
D. H. La Germana Demokratia Respubliko sin prezentas	14
Vesa Paspaleeva. Novjaro. Trad. L. Paspaleeva	15
Georgi Simeonov. Esperanto — lingva ŝlosilo	16
Nikola Nikolov. Hoteloj por esperantistoj	16
Raymond Schwartz. Prelego pri fundamentaj elementoj de Esperanto . .	16

Sur la kovrilpaĝo:

Momento el la inaŭguro de monumento al la granda kontraŭ-faŝisto kaj esperantisto *Angel Petkov Ivanov (Anĝelo)* en urbo Orjanovo (Vidu la materialon „Nia neforgesebla Anĝelo“ de N. Aleksiev en „Bulgara Esperantisto“ № 7—8/1969)

Abonkotizo: jara — 1,40 levoj, duonjara — 0,70 lv. Por eksterlando — 2 lv., 2 rubloj, 2 dolaroj aŭ egalvaloro; por Albanio, ĈSSR, Hungario, Jugoslavio, Pollando kaj Rumanio—1,60 lv. Por Italio — 1000 liroj. Aparta numero — 0,14 lv. Reklamtarifo: 0,15 levo por cm²; sur tuta kovrilpaĝo — 80 lv; korespond-anoncoj: 5 stotinkoj por ĉiu vorto; eksterlandaj adresoj — publikigataj senpage.

ENLANDAJ PERANTOJ DE „BULGARA ESPERANTISTO“

(Pliaj perantoj el diversaj landoj estas serĉataj)

ALBANIO: Ing. Cefo Fiko, R. Kongresi Përmetit 7—11/10, Tirane.

ITALIO: Julia Franceschi, str. Francesco Nullo 2, Padova.

KOREO: Korea Esp. Asocio, Pjeng' jang P. O. kesto 16.

NEDERLANDO: Ru Bossong, Floraplein 2 Eindhoven.

RUMANIO: Miĥail Popescu, Cal. 13 Septembrie 65, Bukaresti 5.

SOVET-UNIO: Ivan Palkin, ul. Televidenija D. 7, kor. 3, kv. 44, Moskva, M—449.

SVEDIO: Karl Kvist, Deje, Box 109.



LARĜAJ PERSPEKTIVOJ DUM LA NOVA JARO

La agado de la bulgara esperantistaro dum 1969 estas riĉenhava kaj utila. En la novembra Plenkunsido de CK de BEA oni sufiĉe parolis pri tio. Neniam la bulgara esperantistaro povis revii pri similaj atingajoj, kiujn ĝi fakte akiris dum la regado de Patrolanda Fronto. Pri la sukcesoj de BEA oni scias ankau en la Internacia Esperanto-Movado.

Tamen plej malbona pozicio povas esti la ripozado sur laŭroj . . . Tial ne forgesante pri la sukcesoj, ni ĉiam devas rigardi antaŭen kaj serĉi novajn eblecojn por plilarĝigi nian influon, plifortigi nian organizan bazon, eduki novajn aktivulojn, altiri al niaj societoj novajn adeptojn. Nur tio povas alporti al ni daŭrajn, neefimerajn, nekontestebajn sukcesojn.

La Plenkunsido de CK ĝuste el tiu vidpunkto pritaksis la nunan staton de la asocia agado kaj fiksas en siaj decidoj la ĉefajn direktojn de nia aktiveco dum la sekvanta periodo. Fakte, la decidoj de la plenkunsido estas nova konkretigo de la rezolucio de nia 37-a landa Kongreso, okazinta en Varna en 1968.

Al kiuj ĉefaj taskoj direktas nin la lastaj decidoj?

Unuagrada devo de la societoj, distriktaj komitatoj kaj CK estas la eduko de la membraro en spirito de konscia partopreno en la konstruado de matura socialisma socio. Tial ĉiuj devas ligi sian tutan agadon kun la brila renkonto de la 100-jara datreveno de la naskiĝo de Lenin — nia genia instruisto pri la principoj kaj vojoj al starigo de socialisma kaj komunisma socio.

Elstaranta urĝa tasko estas la aktiveco kaj stabiligo de niaj societoj en urboj kaj vilaĝoj. La unuan violonon en tiu grava afero ludos, kompreneble, niaj distriktaj komitatoj, helpataj sisteme kaj energie de la Centra Komitato. La specialigitaj faksekcioj ricevas puŝon al plibonigo de sia ĉiufanka agado. La Plenkunsido aprobis la aliĝon de nia Asocio al la Patrolanda Fronto en formo de kolektiva membreco, konservante kiel ĝis nun nian plenan organizan, financan, kulturklerigan sendependecon. Temas pri kolektiva realigado de taskoj komunaj al granda nombro de sociaj organizaĵoj, por ke oni ne disigu la fortojn kaj ne forprenu superfluan tempon de la loĝantaro. Plej konvena formo por tiu racia agadmaniero estas la organizaĵoj de la Patrolanda Fronto, kiel plej larĝa unuiĝo de la politikaj kaj sociaj fortoj de nia lando.

Alia grava tasko antaŭ ni estas la sistema kulturkleriga agado, rezulte de kiu ni povas atendi ankoraŭ pli senteban altiĝon de la socialisma konscio de nia membraro. Por la antaŭstaranta X Tutlanda Junulara Esperantista Festivalo la programoj devas esti bone kaj riĉenhave preparitaj en patriotisma kaj leninisma spirito.

La abonkampanjo por „Bulgara Esperantisto“ devas atingi pli grandajn sukcesojn ol ĝis nun. Tio rilatas ankaŭ la ceterajn Esperanto-eldonaĵojn.

La kurslaboro estis unu el la centraj punktoj de la diskutado. Pro la plena elĉerpiĝo de lernolibroj kaj vortaroj oni donis taskon al Bulgara Esperantista Kooperativo organizi la eldonadon de novaj lernolibroj kaj helpiloj. La kurslaboro estu direktita ĉefe al la instruistaro kaj lernantaro. La preparo de novaj kvalifikitaj instruantoj de Esperanto staras kiel tre respondeca devo antaŭ niaj distriktaj komitatoj kaj CK de BEA.

Nia centra organo „Bulgara Esperantisto“ ankaŭ estis temo, lige kun kiu oni faris multajn proponojn por la konstanta plibonigo de la enhavo de l' revuo. En la rezolucio estas fiksitaj la devoj de la redakcio.

En la rezolucio trovis lokon ankaŭ la taskoj de la bulgara esperantistaro en la organizado de internacia korespondado kaj digna partopreno en diversaj internaciaj esperantistaj aranĝoj. Pli speciale oni emfazis la neceson helpi ankoraŭ pli rezulte la batalon de la loĝantaro de Suda Vjetnamio por senkondiĉa kaj tuj ĉesigo de la agresmilito de Usono. La plenkunsido aprobis koncernajn dokumentojn.

Kiel ĉiu povas konstati, la taskoj estas fundamentaj, gravaj kaj decidaj por la estonta evoluo de nia Asocio. Se ni havas la fortan deziron stabiligi niajn ĝisnunajn sukcesojn kaj atingi novajn — ni devas okupiĝi senprokraste pri ilia realigo! Sendube, ke niaj plej konsciaj membroj kaj organoj ĝuste tiel kondutos.

Dum la Nova Jaro — al novaj sukcesoj!

HONORA VERDA TABULO

Responde al nia alvoko atingi 4000 abonantojn de „Bulgara Esperantisto“ kelkaj gekamaradoj jam raportis pri bonaj sukcesoj.

Unualoke staras kamarado



DIMITR IVANOV
el Plovdiv (str. Stranĝa 4)..

Ĝis la 22-a de novembro li kolektis 97 abonojn por „BE“.

Krome li kolektis abonojn ankaŭ por:

„Paco“ — 5.

„Ripozoj“ — 5.

„Nuntempa Bulgario“ — 3.

„Internacia Ĵurnalisto“ — 2.

K-do Dimitr Ivanov kolektis ankaŭ 127 membro-kotizojn por 1969.

Dankon, k-do Ivanov! Via senlaca modela agado estas sekvinda ekzemplo por ĉiuj esperantistoj. La estraro de CK de BEA kaj la redakcio de „BE“ tutkore salutas vin!

N atendas tujajn informojn el aliaj lokoj. Novaj abonigoj estas ankoraŭ eblaj — sendu monon kaj adresojn al la kancelario de BEA.

NI NEPRE ATINGU 4000!

NOVAJ NEKONATAJ MATERIALOJ PRI MAKSIM GORKIJ KAJ ESPERANTO

(Daŭrigo de № 10 de „BE“)

Ĉu vi memoras la rezonojn de la sciencisto Lomonosov en „Rusa gramatiko“ pri la specifoj de lingvoj de diversaj popoloj? Lomonosov menciis la opinion de Karlo la Kvina, kiu kutimis paroli dece en la hispana lingvo kun dio, en la franca — kun la amikoj, en la germana — kun malamikoj, en la itala — kun la ina sekso. Lomonosov asertis, ke se la roma imperiestro lertus en la rusa lingvo, li trovus en ĝi la majestonde l'hispana, la viglon de la franca, la subtilon de l'itala kaj super tio — la riĉon kaj la forton en la priskriboj, la koncizon de l'greka kaj latina lingvoj. Turgenev nomis nian lingvon granda, verama kaj libera. Kaj mi diros: tia ĝuste ĝi estas. Sed, ĉu vi vidas en kio estas la esenco: Lomonosov, Turgenev kaj mi, multpeka — estas neobjektivaj atestantoj: ĉiuj ni proksime parencas kun la rusa lingvo. Mi pretas aserti, ke por ĉiu popolo la gepatra lingvo estas la plej kara kaj granda trezoro. Ĉu vi dubas?

— Ni ne dubas!

— En tio estas la najlo! Kaj kio koncernas Esperanton, tiun ĉi „nenies lingvon“, laŭ objektiva atesto de l'pensantaj homoj, ĝi estas la lingvo, en kiu jam hodiaŭ oni povas trakti ajnan sciencan disciplinon kaj kompreni kun malamiko, kiel ankaŭ kun kamarado. Kaj, — Gorkij faris intence malserenan vizaĝon, lumiginte ĝin per ruzeco en okuloj, — kaj, certe, kun la amatino, decidante la plej gravajn demandojn de la ekzisto. Esperanto estas universala lingvo! Ĝi vivos, perfektigos kaj, mi ripetas, venkos ĉiujn malamikojn, faligante ilin subpieden. Ĝi estos la plej granda, kultura venko kaj, krome, plene sensanga.

Gorkij eksilentis mergiĝinte en rememorojn. Por momento li forgesis pri ni.

— Sed kial do,—demandis Bobriŝev,— Esperanto ne estas propagandata? Niaj esperantistoj preskaŭ vegetas en postkortoj!

Gorkij gruntis, denove movis ŝultron. La frunton krucis reto da sulkoj.

— Ankaŭ ĝia vico venos. La unuajn jarojn post Oktobro ankaŭ ĉe ni oni provis malfermi larĝe la pordon al Esperanto. Sed . . . io ekbremsis, iu ion ne prikonsideris, ien deflankiĝis. Alfluis tiom da urĝaj kaj bruligaj aferoj, ke mankis tempo por Esperanto. Kaj iu ankaŭ la malpurajn enmetis en la puran aferon. Sed mi estas certa: Esperanto traboros fluejon ankaŭ ĉe ni, ĉar ĝi estas postulo de l'vivo. Esperanto komencos novan epokon en la scienco pri la lingvo.

Mi demandis:

— Sed kial ne destini iun el la plej disvastigitaj naciaj lingvoj kiel helpan lingvon, se Esperanto ne estas akceptata de la registaroj?

— Bonege! Sed kiun „naturan“ lingvon oni povas rekomendi por la celo?

— Nu, anglan, germanan, kaj, eble, iun alian? Unuvorte tiun, en kiu plej de homoj parolas.

— Tiel do! Kial ne la ĉinan? En ĝi ja kompreniĝas kvarono de l'homaro. Krome, ĝi apartenas al la plej antikva popolo. Ne, miaj karaj, — Gorkij dismetis la manojn— ajna lingvo, pretendanto por monddomino, estos proklamata agresa kaj simile al ajna Napoleono fiaskos. Ĉiuj mil kvincent lingvoj, movataj de vivaj bezonoj, furioze alarmos kaj faros juste. Ĉiu nacia lingvo

konstruiĝis dum jarmiloj. La lingvo estas unu el la ĉefaj elementoj, difinantaj la vizaĝon de l'popolo . . .

Gorkij ĵetis rigardon tra la fenestron, movis fingrojn kaj sin turnis al ni pri tio per la vortoj de la poeto: „En lingvo la popolo sin donas. En ĝi naturo ĝiasonas, animo kaj „vivmaniero“. Ajna gepatra lingvo ĉiam estas „plej bela“, sed ĝi portas en si la ŝarĝon de l'tradicioj, kiuj faras ĝian gramatikon kaj prononcon komplika kaj malfaciligas la studon. Oni ja ne militus, diablo prenu, kontraŭ la tuta mondo por triumfo de la gepatra lingvo, eĉ se en ĝi parolas la triono de l'homaro! Ne kaj ne!

— Kaj se Esperanto ne ekposedos la amasojn kaj restos propraĵo de amatoroj — kiel tiam?

Gorkij ekradiis.

— Neniel, do! La homoj kreos alian lingvon, pli perfektan, sed nepre kreos. Tamen mi estas konvinkita, ke alia lingvo ne estos bezonata, ja ekzistas Esperanto. La homaro eniris la periodon, kiam progreso ne marŝas, sed flugas. La bezono de kontaktoj kreskas, akre kreskas ankaŭ la neceso de internacia helpa lingvo. Kaj tia lingvo povas esti nur Esperanto — mirakla interkomprenilo!

Gorkij denove tuŝis la malfacilecon de l'studo de „naturaj“ lingvoj. Li asertis, ke tio disigas la homojn kaj eternigas al neniun bezonatan diverslingvecon. Subite li laŭtigis la voĉon:

— Certe, la diverslingveco estas bezonata al ekleziuloj kaj al la biblia Jehovo, jes! — Gorkij ankoraŭ plivigliĝis. — Multlingveco, laŭ opinio de religiaj servantoj, estas la plej klara pruvo pri enmiksiĝo de dio en la terajn aferojn. Pro la provo de homoj konstrui turon kun alteco ĝis la ĉielo, dio „miksas la lingvojn“, senigis ilin de kapablo kompreni unu la alian. La miraklan turon, enkorpiĝantan la teran revon pri la ĉielo, ili disprenis por bestoj kaj mem transformiĝis en duonbestojn.

Gorkij estis serioza. Rakontinte pri la „Babilona turkonstruo“ kaj ĝiaj sekvoj, li notis kun nuanco de bedaŭro:

— Jen kion signifas eĉ en biblia trakto la diverslingveco. Kiam la homaro venkos la „malbenon de l'ĉiopova“, ĝi kunfandiĝos en unu familion kaj akiros neimageblajn fortojn.

— Jes, sed kiam ĉio ĉi okazos?

Gorkij rapide respondis:

— Certe ne laŭ dia ordono kaj eĉ ne laŭ nia volo. Certe multo dependas ankaŭ de ni, ĉar nun ĉiuj vojoj kondukas al tio. Ni iras al komunismo, kiel nokto iras al sunleviĝo. Kaj Esperanto fariĝos la lingvo de morgaŭo. Tial ĉiu esperantisto estas homo, verŝanta akvon en la radon de ĉi-morgaŭo. Ĉiukaze, li, la homo, iras kun vizaĝo antaŭen, al estonto, sed ne malantaŭen, en pasinton.

Ni demandis:

— Tamen Esperanto malrapide trabatas sian vojon. Kvindek jaroj!

— Absolute ne tiel malrapide. Stulta obstino de iuj el la nombro de l'fortaj de ĉi-mondo strebas malhelpi al ĝia triumfo. Kvindek jaroj? Vi diras — historie tio estas momento. Sed dum la momento la semo, ĵetita de Zamenhof, ekkreskis. Kaj iĝis arbo kun verda krono. Ĝi timas jam neniun sekigan veteron.

Gorkij denove sin adresis al la esperanta vortaro, denove komencis rigardi ĝiajn paĝojn. Intercetere li demandis:

— Ĝustaloke, ĉu vi scias la sencon de l'vorto Esperanto? Vi ne scias? Ĝuanta esperon, esperanta — jen estas ĝia signifo. Mi estas ankaŭ esperanta, kvankam, ve! — mi ne estas esperantisto. Ne sufiĉis tempo — kaj nun mi bedaŭras. Sed oni ne kapablas ĉion ĉirkaŭpreni.

Rememorinte denove pri Zamenhof, li diris:

— Grandan faron plenumis Ludoviko Zamenhof! . . . Kiaj vortoj — vera

muziko !

Foliumante, li legis.

— Mesĉanin — burĝo. Parazit — parazito. Rabotnik — laboristo. Geroj — heroo. Gerojskij — heroo.

Bobriŝev kaj mi rigardis unu la alian kaj ne povis ne rideti. Gorkij ŝajnis, ke li legas, sed reale li prononis la vortojn, laŭ memoro ne rigardante la tekston. Sekve, Esperanton li estis studinta, kaj multon memoris.

Redonante la vortaron, li demandis:

— Ĉu vi ne okupiĝis pri la lingvo? Provu! Mi scias, Tolstoj alte taksis Esperanton, studis ĝin. Ne nur Tolstoj: multaj seriozaj homoj konsideras Esperanton ne bagatelaĵo.

Gorkij akompanis nin kiel novajn esperantistojn. Premis la manojn, amike ridetis. Iomete solene li basis:

— Ĝis revido! La estonto apartenas al Esperanto (esperantlingve).

La ekmiron sur niaj vizaĝoj li estingis per klarigo:

— Tio signifas . . . — kaj li tradukis siajn frazojn en rusan lingvon. — Studante la sinonimojn de l'gepatra lingvo, okupiĝu ankaŭ pri Esperanto! Nenion vi perdos, multon vi akiros.

Aldono

Okazis tiel, ke post la konversacio kun Gorkij — tio estis en jaro 1933 — nek Bobriŝev, nek mi povis sekvi lian konsilon, kaj ni ne alpaŝis al Esperanto. Nur post multaj jaroj ebligis rememoro pri Zamenhof kaj lia verko. Kaj tiam nevole aperis la penso: kion do skribis Gorkij pri Esperanto? Ne povas esti, ke li preterlasis en silento la „titanan laboron“ de Zamenhof, tiel alte taksita de li en la konversacio kun ni.

En la tridekvoluma verkaro mi ne sukcesis trovi eĉ mencion pri Zamenhof kaj Esperanto. Tamen iom da insisto — kaj la serĉoj kroniĝis de sukceso. En la ĵurnalo „Heroldo de artistoj“ („Vestnik Rabisa“) № 7/10 por 1921 estas publikigita letero de Gorkij, entute dediĉita al Esperanto. Defen-

dante la novan lingvon kontraŭ atakoj kaj argumentante ĝian rajton de ekzisto, Gorkij skribis:

„La konservativa penso obstine pravas, ke Esperanto estas utopia iniciato. La viva, leĝkonforme evoluanta realo, ne rapidante, sed ĉiam pli decide, refutas la opinion de l'konservativuloj.“

En alia loko de la letero li deklaris:

„Oni diras, ke la lingvo ne evoluas, estante artefarita.“

Mi ne estas esperantisto, sed mi scias, ke la artefarita lingvo, evolante sufiĉe rapide, iĝas plene natura fenomeno, ĉar ĝi respondas al la neceso de l'nuntempaj homoj trovi, krei ĝenerale kompreneblan lingvon.“

La leteron Gorkij finis jene:

„Ĉu oni povas nei, ke lingvo, sola por ĉiuj, donos potencon impulson al la procedo de kultura evoluo?“

Oni ne povas. Sekve necesas agnoski kiel neeviteblan — la kreon kaj disvolvon de la lingvo.“

Daŭrigante la serĉojn, mi min turnis al la komplekto de „Informoj de CK SEU“ (Izvestija CK SESR“). En n-ro 3/4 por 1928 de la „Informoj“ estis presitaj fragmentoj el la artikolo de Gorkij „Respondo al inteligento“ per jenaj vortoj:


„La strebo krei lingvon solan por ĉiuj homoj, estas unu el la aŭdacaj ĝis frenezo aspiroj, kiuj ĉiam servis, nun servas kaj ĉiam servos al la afero de organizo de l'mondo laŭ la volo de l'homo kaj por senlima disvolvo de l'kapabloj de l'homo.“

Estas sendispute, ke parolante unu solan lingvon, la laboranta homaro multe pli rapide komprenus la neceson de siaj interesoj.“

Troviĝis ankaŭ aliaj fontoj (nepublikigitaj leteroj, eldiroj en la gazetaro), atestantaj pri tio, ke Gorkij estis konvinkita adepto de Esperanto: la vortoj de l'granda homo neniam disiris de liaj faroj. Pri tio konsentos ĉiu, kiu

(daŭrigo sur p. 7)

PEJO K. JAVOROV



Nia granda poeto Pejo K. Javorov naskiĝis en 1878 j. en Ĉirpan, en malriĉa metiista familio.

Unue li studis en sia naskiĝurbo, poste en gimnazio de Plovdiv, sed pro manko de monrimedoj forlasis la lernejon, revenis en Ĉirpan kaj fariĝis poŝtoficisto. Jam kiel lernanto li komencis verki siajn unuajn versaĵojn.

Poste li estis poŝtisto en Pomorie, kie verkis sian belan poemon „Kaliopa“. Sub la influo de la socialismaj ideoj li verkis la versaĵon „Majo“, „Sur la grenkampo“ „Hajlo“ k. a., en kiuj respegulas la pezan, malgajan vivon de la vilaĝanoj en la kapitalisma socio. Li pentras kun granda majstreco kaj vera simpatio la mizeron de la malriĉaj vilaĝanoj.

Javorov verkis ankaŭ versaĵojn dediĉitajn al la batalo kontraŭ la nacia subpremo, kiel „Armenoj“, „Ekzilitoj“ k. a. Li prikanas elkore la malfeliĉan sorton de la persekutataj kaj turmentataj armenoj.

En 1900 j. transloĝiĝis en Sofion, unue kiel oficisto en la Ĉefa Direkcio de la Poŝtejoj kaj poste kiel artisma sekretario de la Nacia Teatro. En la ĉefurbo li estiĝis intima amiko kun la poeto Penĉo P. Slavejkov, la aŭtoro de „Sanga kanto“, kun Petko J. Todorov, la majstro de la idilioj, kaj d-ro Kiril Krâstev, profesoro kaj literatura kritikisto.

Ili ĉiuj formis la faman literaturan grupon „La kvaropo“.

Javorov konatiĝis ankaŭ kun la legendeca gvidanto de la makedona revolucia organizaĵo — Goce Delĉev.

En 1903 li partoprenis vigle en la fama ribelo por liberigo de Makedonio elsub la turka jugo, konata sub la nomo „Ilindensko vâstanie“ en 1903. Poste li realisme priskribis sian agadon dum la ribelo kaj publikigis la libron „Hajdutaj sopiroj“.

Pejo Javorov posedis grandan talenton de vera poeto, poeto de sinceraj, koraj sentoj, de amo, de plej mildaj kordoj de la homa animo. Belega estas lia verslibro „Post la ombroj de la nuboj“.

Li verkis ankaŭ la dramojn: „En la piedoj de Vitoŝa-monto“ kaj „Kiam ektondras — kiel la eĥo silentiĝas“, kiujn ankaŭ nun oni prezentas sur niaj teatraj scenejoj.

La verkaro de Pejo Javorov estas riĉa kaj varia. Ĝi pliriĉigis nian nacian literaturon, nian literaturan lingvon.

La vivo de Javorov estis tre malgaja, plena je tragedioj. . . Li mortis en 1914.

La domo, kie loĝis Javorov en 1912—1913 sur str. Rakovski 136 en Sofio nun estas Domo-Muzeo de la granda poeto de la bulgara literaturo.

J. Atanasov

BELEGAJ DU OKULOJ

de Pejo K. Javorov

Belegaj du okuloj. Animo de infano
en du okuloj belaj; —muziko—lum' radia.
Ne volas, ne promesas ili . . .

Preĝadas koro mia,
infano,
preĝadas koro mia!

Sufero kaj pasio
vualos ilin en estonto
per peko kaj per honto.

Per peko kaj per honto
ho, ne vualos ilin
sufero kaj pasio.

Preĝadas koro mia,
infano,
preĝadas koro mia . . .

Ne volas, ne promesas ili! —
Belegaj du okuloj: Muziko, lum' radia
en du okuloj belaj. Animo de infano.

Tradukis: Asen Grigorov

De sunsubiro orumitaj,
ruĝetas vastoj de la mar';
en danco ŝtorma lacigita,
ripozas pace la ondar'.
La ŝipo per facila vento
sin portas, portas al la for',
kaj malaperas firmamenten
vi, karpatruja bord'.

Kaj jam por ni por rea vojo
neniam eble venos tag'.
Akvar' kaj ter' — la mondo ĝoja
por ni estiĝos sonĝimag'.
Kaj Vardar, Struma kaj Marica,
Balkano, Stranĝa kaj Pirin
brilados astroj — longa vico —
por suferigi nin.

Rompantoj de la jug' premanta,
nin vendis fia insidul'.
Servantoj de la devo sankta,
kondamnis nin la subigul'.
Kaj ni. . . ni povis, karpatrujo,
ni povis ĝis la fin' kun ard'
batali firme — sorto ĝua,
ĉe via sanktaltar'.

Sed, ve, la ŝipo ne atendas,
naĝadas pluen tra l'mallum',
forportas nin. . . La nokt' etendas
mantelon sian jam. Kaj nun
ni vidas nube la konturojn
sur la krepuska blua fon',
la rezignantajn grandstatureojn
de l'fama pra-Aton'.

Kaj ni tra ekfluontaj larmoj
returnas nin por lasta foj'
al niaj limoj milde ĉarmaj,
etendas ni por lasta foj'
malfortajn manojn en katenoj
al nia forperdata land'. . .
La korojn tristamar' venenas —
adiaŭ, patroland'!

Tradukis S. Kiraĝiev

Interrilatis kun li kaj aŭdis la imponan,
akcentantan ĉiujn vokalojn „o“ (ne-
kutiman por Moskva prononco) tre
konvinkan bason de Gorkij.

I. Ŝkapa

*Ilja Ŝkapa estas soveta verkisto. Kun la
famekonata soveta verkisto Maksim Gorkij
li longe laboris en la ĵurnalo „Niaj Atingoj“.*

Se bulkojn provos fari la ŝuisto
Kaj ŝuojn la bulkisto,
Sciate estas, kio iĝos ja rezulte.
Kaj estas en la vivo da ekzemploj multe, —
Ke kiu pri metio fremda ŝatas okupiĝi,
Obstinas stulte kaj nenion konsideras.
Li estas preta vidi la aferon difektigi

Kaj eĉ preferas
Suferi malutilon,
Ol ĉe scianta homo, bona kaj sincera,
Prudenton peti kaj aŭskulti la konsilon

Decidis la Ezoko estimata
Okupi sin pri la metio kata.
Ne scias mi, ĉu lin instigis la diablo,
Aŭ lin ektedis fiŝa tablo.
Do, sin direktis li al Kato kun la peto,
Ke ili iru al grenejo, la najbara,
Ekĉasi musojn por matenmanĝeto.
„Sed ĉu vi konas tiun ĉi metion, kara?“ —
Demandis lin la Kato kun rideto. —
— Pripensu, kara, bone pri ĉi tio,
Por ne hontadi poste pro ia avario.
Bezonas majstron kiu ajn metio.“
„Afero granda! Musĉasado!
Ĉu estas pli facila mia fiŝkaptado?“
„Nu, bone! Iru ni, se vi vin sentas pre-
parita.“

Satiĝis Kato de l'abunda musa stoko
Kaj iris vidi kion faras la Ezoko:
Apenaŭ viva kuŝas tiu ĉi al ĉiuj por pri-
moko,

Kun vosto — de la musoj formordita.
Vidante lian kompatindan plagon
Transjetis lin la Kato en la lagon
Kun jenaj vortoj skuaj,
Sed tre instruaj:

„Stampiĝu en memoro via tiu vero:
La muskaptado estas ne ezokafero.“

Tradukis el rusa: Ljubomir Miĥajlov
Noto de la Red. La traduko de „Ezoko
kaj Kato“ ricevis laŭdan mencion en la
Literatura Konkurso de UEA-Helsinki 1963.

BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO — KOLEKTIVA MEMBRO DE LA PATRO- LANDA FRONTO

CK de BEA en sia Plenkunsido de 17. XI. j. k.
prenis la jenan gravan decidon:

Aprobas la kolektivian membrecon
de Bulgara Esperantista Asocio en la
Patrolanda Fronto kaj la realigon de
unuecaj iniciatoj kune kun aliaj ama-
saj organizaĵoj kaj kreaĵoj asocioj.

LA „RÂĈENICO“ PLORIS
(Daŭrigo de № 11 de „BE“)

Tute nerimarkite ĉe la rando de iu el la tabloj ekstaris tri el niaj muzikistoj: guzlisto, sakflutisto kaj ŝalmisto. En la sama momento la malgranda Ĥristina ekvidis la muzikilojn kaj manplaudis. La knabeto tuj ŝovis sin sub la tablon kaj ekstaris ie proksime de la muzikistoj. Kiel gaja infano la râĉenico eksaltis sur la tabloj kaj igis la tutan restoracion — bulgarojn kaj ĉi-tieajn — rideti amike. Unu el tiuj bulgaraj râĉenicoj, kiuj igas niajn krurojn propravole ludi, kiam la viglaj sonoj petolas en nia sango, kaj per nenio ni kapablas pacigi ilin.

La doktoro ekstaris. En la komenco ni ne komprenis, kial lia vizaĝo estis tute pala, spiritigita, streĉita. Li trapasis inter la densaj seĝoj kaj direktis sin al tiu malplena loko, kiu nature formiĝis inter ambaŭ flankoj de la salono. Li alproksimiĝis kun tia seriozeco kaj atento, ke eĉ kiam metis manojn sur sian lumbon, ni ankaŭ ne konjektis, ke li volas ludi. Sed la sonoj ekportis lin pli kaj pli rapide, la granda korpo kun neordinara lerteco sekvis la ritmon de la râĉenico, li jen kaŭriĝis facile, jen denove ekstaris impone, faris majstre rondon post rondo, aŭ tuj najliĝis, por ekflugi en ankoraŭ pli vigla danco.

Mi ne vidis, kiam apud li ekstaris ŝi. Eta, sulkigita, kun nilonaj punktoj sur la manikoj, kun glacedaj ŝuoj... La patrino. Ne rigardante iun ajn, ŝi faris la unuajn paŝojn de la râĉenico tute malrapide, poste triumfe levis unu brakon, ektemis la punktoj de la alia kaj ia tremetanta voĉo provis ekkrii, sed ĉesis en la trosekigita gorĝo. Sed jen denove ŝi turniĝis, eksaltis antaŭen, deflankiĝis malantaŭen kaj flanken — kaj ree antaŭen... Tute eta antaŭli. Tute eta.

Patrino kaj filo! Ekzilitoj!
Ili ludis kaj ploris. La larmoj treme ekbrilis jen sur la granda vira vizaĝo, jen sur la malgrasaj vangoj de la maljunulino, kaj ni ĉiuj vidadis nur tiujn larmojn.

Ploris ili kaj ludis.

La sakfluto laŭtigis sian voĉon, kvaŭ eksentis ilian doloron, la râĉenico fariĝis pli vigla, pli gaja, pli aŭdaca... Kaj ju pli gaja ĝi fariĝis, des pli forte sufokis nin senbrua, senvoĉa ploro... Kia râĉenico!

Kiel lavangoj de Rila-neĝo¹ blankiĝis en la maldekstra angulo la altaj kuiristaj ĉapoj de kelkaj negroj, elirintaj el la kuirejo. Kia homa kunsento lumis sur la nigraj vizaĝoj! La usonanoj el la flanko ankaŭ estis stariĝintaj kaj en silenta streĉo sekvis ĉiun movon de la patrino kaj la filo.

La nepino de la maljuna bulgarino el la distrikto de Stara Zagora observis jen sian avinon, jen sian patron, jen la sakfluton. Du okuloj demandis, fajreris pro entuziasmo, fermetis sin pro timo, gaje brilis, petis... „Ekmemoru tiun ĉi momenton, por ĉiam ĝin ekmemoru, Ĥristinka! — mi diris al mi kaj ŝovis fingrojn en la varmetan infanharareton. — Mi volus, ke ĝi estu via naskiĝtago!“

La râĉenico ploris.

La sakfluto ekfajfis tirvoĉe kaj la lasta sono alnajliĝis en la fumoplena spaco super niaj kapoj.

La restoracio eksilentis.

Unue degelis subite la blanka lavango de la kuiristaj ĉapoj, poste la vizitantoj de l'alia duono de la salono brue sidiĝis. La doktoro kun klinita kapo venis ĉe sian lokon, sed ne sidiĝis. Li silentis tiel, staranta unu mi-

¹ Rila — la plej alta monto en Bulgario.

nuton, kvazaŭ serĉis la necesajn vortojn, kaj ne povis ilin trovi, poste li malrapide ekparolis:

— Sinjoroj kaj sinjorinoj, miaj karaj gastoj!

Post la alparolo li faris ankoraŭ unu longan kaj turmentan paŭzon kaj poste levis la kapon. Lia vizaĝo estis blanka.

— Tridek kvar jarojn, ekde kiam mi forlasis Bulgarijon! Mi estis junulo. Mi travivis ĉiujn turmentojn de kruela ekzisto. Kun forta streĉo de mia volo tute sola mi sukcesis venki la nehomajn malfacilaĵojn. Mi laboris kaj studis. Mi fariĝis kuracisto, sukcesis altiri multajn pacientojn. Mi riĉiĝis. Mi ricevis ĉion, al kio mi strebis — unu rondon de la amerika inteligentularo, kiu estimas min, belan familion kun du infanetoj, bonan edzinon . . . Fine, antaŭ du jaroj, ĉi tien venis la plej proksima homo, kiun mi havas — mia patrino . . . Sed mi deziras konfesi al vi, miaj fratoj, ke ununura feliĉa tago post tridek kvar jaroj por mi estas la hodiaŭa! Neniam ĝis nun! — Du viraj larmoj eksidis en lia gorgo kaj li ek-

silentis. Silentis ankaŭ ni. Li ripetis. — Neniam ĝis nun mi estis tiel feliĉa! Mi adiaŭis kun Bulgario, mi pensis, ke mi jam ne vidos ĝin, sed jen vi ĝin alportis ĉi tien, en tiun malproksiman Kanzas Siti, kie la ununura bulgaro estas mi . . . Mia bela Patrolando! KREDU MIN, ke pli feliĉa tago ol tiu por mi neniam estos! Neniam estos! . . .

Li riverencis. Riverencis profunde, kvazaŭ ne estis antaŭ kantistinoj kaj muzikistoj, kiuj kantis kaj ludis antaŭ nelonge, sed antaŭ sia Patrujo. Ni sidis tuŝitaj de la majesteco de tiu ĉi momento, de la tragedio de l'forpelito, de la konsterniga forto de l'nostalgio.

La malgranda Hristina ŝovis manon en la mian. La edzino-svedino klinis kapon en profunda kunsento. Iu en la fundo de la salono provis manplaŭdi, sed subite haltis.

Nenio pli estis necesa!

El la alia flanko de la restoracio, el la muzikĉambro alflugis mallaŭtaj sonoj de tuisto.

Ni estis en Unuiĝintaj Ŝtatoj de Ameriko.

El bulgara: Rosica Georgieva

KONCIZE

● La Pleno de CK de BEA, kiu okazis la 17-an de novembro j. k., sendis saluttelegramojn al CK de BKP, al la Registaro de Demokratia Respubliko Vjetnamio, al la Provizora Revolucia Registaro de Suda Vjetnamio kaj al la Vjetnama Pacdefenda Esperantista Asocio. Specialan telegramon la Pleno sendis al s-ro Nixon — prezidanto de Usono, proteste kontraŭ la usona agresmilito en Vjetnamio kaj kontraŭ la neglekto de la Ĝeneva Konvencio de 1954 j.

● En la organo de UEA „Esperanto“ n-ro 11/1969 aperis favora recenzo pri „Elektita verkaro“ de Hristo Botev de Sima Milojeviĉ.

● En ĵ. „Veĉernjaja Perm“ (n-ro 228/27. IX. 1969) organo de l'Urba Komitato de Komunista Partio de Sovetunio kaj la Urba Ŝoveto de

l'Laboruloj en urbo Perm, aperis en ruslingva traduko la rakonto „Mia entrepreno“ de Olga Pĉelinska kun indiko, ke la traduko estas farita laŭ la esperanta traduko de tiu ĉi rakonto, aperinta en revuo „Bulgara Esperantisto“, n-ro 3—4/1969. La ruslingvan tradukon faris nia soveta samideano A. Seljankin.

GRANDIOZA ORGANIZAĴO

„La delegita servo de UEA estas grandioza bonega organizaĵo por ĉiu esperantisto.“ Tiel entuziasme skribis la familio Bartovic, el Ĉeĥoslovakio, tuj post sia reveno hejmen el 4250-kilometra vojaĝo tra Eŭropo. La tutan vojaĝon ili planis kaj plenumis dank' al la helpo de la delegitoj aŭ fak-delegitoj de UEA por turismo en ĉiuj lokoj, kiujn ili vizitis. S-ro Bartovic raportis: „Mi devas laŭdi, ke ĉiuj delegitoj al mi rapide respondis.“ Li aparte emfazis, ke en multaj lokoj lia familio povis intime konatiĝi kun alilandanoj tiel, kiel certe ne eblus sen helpo de delegitoj.

PLURAJ ESPERANTO-KURSOJ EN LA LANDO

Informoj pri pluraj E-kursoj en diversaj loĝlokoj venas konstante en la Redakcion. Ĉi-sube ni donas kelkajn el ili.

Dospat. Naskiĝis Esperanto-Movado en la profunda sino de Rodopi-montaro, tie, kie troviĝas la plej granda en nia lando hidroenergia konstruaĵo — la kaskado Dospat-Vâca. En v. Dospat oni komencis fakultative instrui Esperanton en la fundamenta lernejo - por gejunuloj. La tri grupojn gvidas nia entuziasma samideano kaj juna instruisto Emil Ĉirpanski. En la E-laboro lin helpas aktive s-inoj Velurina Ĉirpanska kaj Sneĵana Toneva.


Unuafoje en Dospat oni lernas Esperanton. Baldaŭ ĉi tie ekbrilos nova verda stelo - Esperanto-societo.

Kulata-distr. de Blagoevgrad. En la vilaĝa lernejo la 20-an de septembro j. k. ekfunkciis E-kurso por gelernantoj — 20 infanoj. Kursgvidanto — la instruisto Kiril Aprilov.

Vidin. La 15-an de okt. j. k. oni solene malfermis la novan lernejon de Esperanto en la urbo. Ing. Petr Todorov tre interese parolis pri la signifo de Esperanto kaj pri siaj impresoj el la Junulara E-Kongreso en Stokholmo. Komencis funkcii 3 kursoj: 2 por civitanoj kaj 1 por lernantoj (gvidata de la instruisto Ivan Cvetkov).

G. Simeonov

Karlovo. Ĉe la solena malfermo de la nova lernejo de Esperanto parolis ing. Boĵidar Leonov — prezidanto de STELO. Oni malfermis elementan kurson kun 38 gekursanoj, gvidata de B. Leonov, kiu gvidas ankaŭ kurson de progresintoj (11 personoj) kaj parolantan rondon (10 s-anoj). Ĉiuj ĉi grupoj funkcias ĉe la



K. Hozava inter sofiaj esperantistoj (post la oktobra konferenco de Sofia Distrikta E-komitato)

urba legejo „Vasil Levski“, kun kiu la loka E-Societo „Vasil Levski“ tre bone kunagas. La legejo kaj la societo kune formis kant-grupon, teatran kaj danc-trupojn.

Esperanton lernas ankaŭ multaj gelernantoj. En la teknikumo „Ĥristo Botev“ en E-kursoj partoprenas 80 gelernantoj, gvidataj de la instruisto Ivan Sevov. En la politeknika gimnazio funkcias E-lernogrupejoj, gvidataj de ing. B. Leonov.

La esperantistoj kunvenas regule ĉiumerkrede en belan ejon en la legejo.

A. Tanev

Stanke Dimitrov. Je la 15 de okt. ekfunkciis elementa E-kurso en la Kulturdomo „Vasil Demirevski“. Partoprenas 14 oficistoj, laboristoj, lernantoj. Kursgvidanto Boris Drenski.

La 29-an de oktobro finiĝis solene elementa kurso ĉe kudrejo de la laborproduktaj kooperativoj, gvidata de B. Drenski. Tre bonajn sukcesojn havis la kudristinoj Agnica Baĉeva, Milka Ranova, Tinka Malaŝevska k. a. La novaj esperantistinoj komencis korespondi kun ges-anoj el Sovetunio, Kalifornio, Pollando k. a.

B. Drenski

Samokov. Komencis funkcii 2 kursoj: por gelernantoj en teknikumo „Nikola Vapcarov“, gvidata de la instruistino Ani Andonova, kaj unu por civitanoj, gvidata de Vasil Trifonov.

Ĥr. Veceva

Sofio — la Universitato. La 2-an de oktobro solene estis malfermita la nova lernejo de Esperanto en la Sofia Universitato „Kliment Ohridski“. Antaŭ la kunveno parolis je temo „Esperanto — dua lingvo post la gepatra“ la lektoro de Esperanto en la Universitato k-do Kunĉo Valev. Grandan intereson vekis la parolado de la japana esperantistino Kimie Hozava el Tokio, kiu tuŝis la temon „Japanio — lando, lingvo, popolo“. Sekvis malgranda arta programo kaj montrado de interesaj koloraj diapozitivoj pri Sovetunio, kie 15-membra grupo de Studenta E-Societo „Vela Peeva“ faris interŝanĝe ekskurson en la somero. Belegajn kolordiapozitivojn pri Rila-montaro, pramanefaritajn, montris la studento Grigor Kjosev.

Ekfunkciis 4 lernogrupejoj: 2 por komencantoj (entute kun 60 gestudentoj), 1 por progresintoj (kun 15 gestudentoj) kaj 1 supera, metodika — por preparo de E-instruistoj (kun 20 gestudentoj). Nia simpatia kaj tre afabla japana gastino Hozava parolis antaŭ ĉiuj grupoj pri sia lando, pri interesaj kutimoj kaj nuntempa vivo de l'japanoj.

Inter la studentoj regas granda entuziasmo pri Esperanto.

V. Borova

Vraca. En la Teksa Teknikumo jam delonge Esperanto estas instruata fakultative. Gvidanto—la instruisto Enjo Daskalov. Ĉi-jare ekfunkciis 2 fakultativaj lernogrupoj kaj 1 rondeto. La direktorino de la teknikumo Petrana Andreeva helpas la instruadon de Esperanto.

La Lernanta E-Societo „Anne Frank“ estas antaŭ sia 10-jara jubileo. Oni preparas solenan celebradon de tiu ĉi dato. Ĉe la teknikumo estis fondita foto-klubo, kies anoj estas nur esperantistoj. Ilia ĉefa tasko estas prepari filmon pri la E-Movado en Vraca kaj foto-albumon pri ĝia historio.

E. Daskalov

ESPERANTO-EKSPOZICIO EN VELIKO TARNOVO

Dum oktobro j. k. la esperantistoj en Veliko Târnovo aranĝis interesan E-ekspozicion. Ĝi respegulis la historion de la E-Movado en la urbo kaj ties distrikto.

Kun granda intereso oni rigardis la lernolibron de Esperanto de Ĥristo Popov, iama instruisto en Dolna Orjaĥovica, aperinta en 1895 j. Tio estis la dua en nia lando lernolibro de la Internacia Lingvo (la unua — de Miloslav Bogdanov — aperis en 1889).

Forte impresis la angulo, dediĉita al la pereintaj esperantistoj-antifaŝistoj el la distrikto de Veliko Târnovo: Ĥristo Kozlev, Dimitr Djulgerov (Kiskina), doktoro Vârban Genĉev k. a.

Impone parolis pri la signifo de Esperanto kiel internacia lingvo la multaj bildkartoj, fotoj, leteroj kaj aliaj materialoj, ricevita de la lokaj esperantistoj el proksimaj kaj malproksimaj landoj.

T. Kiracov

POLA KULTURA CENTRO ARANĜOS ESPERANTO-EKSPOZICION

Okaze de la Semajno de Internacia Amikeco, kiu okazos en februaro 1970, en la Pola Kultura kaj Informa Centro en Sofio estos aranĝita ekspozicio je temo „Kontaktoj inter bulgaroj kaj poloj per Esperanto“. Por efektivigi ĝin ni bezonas diversspecajn materialojn: fotoj, leteroj, kovertoj, poŝtkartoj, libroj, afiŝoj, suveniroj k. a.

Inter ĉiuj sendintoj de materialoj ni lotumos kvin jarabonojn de revuo „Bulgara Esperantisto“. La nomojn de la gajnintoj ni publikigos en la bulgara kaj pola gazetararo. Materialojn ni resendos, se oni tion anticipe petus.

Samspecajn ekspoziciojn poste ni organizos en la kulturaj kaj informaj centroj de GDR, Ĉeĥoslovakio kaj Hungario.

Bonvolu diskonigi nian iniciaton kaj se vi havas materialojn por la ekspozicioj, tuj sendu ilin al: Oficejo „Esperanto-Turismo“, P. K. 45, Sofio, Bulgario.

Anticipan koran dankon al ĉiuj kunlaborantoj!

PRELEGO PRI ESPERANTO ANTAŬ KOMSOMOLANOJ

La 5-an de novembro j. k. en la klubejo de Komsomolo en v. Momina Klisura, distrikto de Pazarĝik, okazis kunveno de komsomolanoj, antaŭ kiu la prezidanto de la loka E-Societo „Leono“ k-do Jordan Nikolov faris prelegon pri „D-ro Zamenhof kaj la Internacia Lingvo Esperanto“. Li komunikis multajn E-novaĵojn el Bulgario kaj eksterlando. Fine li disdonis al la ĉeestantoj propagandmaterialojn pri Esperanto. Baldaŭ la junuloj komencos lerni la Internacian Lingvon en kurso.

V. Adov

RENKONTIĜO DE ESPERANTISTOJ

Laŭ iniciato de E-Societo „Internacia Amikeco“, en Dimitrovgrad la 15—16-an de novembro j. k. okazis renkontiĝo de esperantistoj el Ĥaskovo, Svilengrad, Marica kaj Dimitrovgrad. Antaŭ la kunvenintoj la prezidanto de la Distrikta Pacdefenda Komitato k-do Ŝterju Ŝterev parolis pri la loko de la esperantistoj en la batalo por paco, kontraŭ la usona agreso en Vjetnamio kaj pri la protesta movado, kiu bolas en ĉiuj landoj kontraŭ la usonaj invadintoj. La ĉeestantoj voĉdonis protestan telegramon al la ambasado de USA en Sofio, en kiu estas dirite: „La esperantistoj el la distrikto de Ĥaskovo energie protestas kontraŭ la agreso de la usonaj imperiistoj en Vjetnamio. Ĉesigu la mortigadon de civitanoj, infanoj kaj maljunuloj! Ĉesigu la forbruligon de vjetnamaj urboj kaj vilaĝoj! La mondo devas vivi en paco! For la usonaj agresantoj el Vjetnamio!“

La esperantistoj metis florkronon antaŭ la monumento de d-ro L. L. Zamenhof. Grupo de junpioniroj el Ĥaskovo sub la gvido de l'instruistino Veliĉka Duparinova prezentis belartan programon en Esperanto.

J. Zavrjanov



La partoprenintoj en la renkontiĝo antaŭ la monumento de d-ro L.L. Zamenhof

TRA LA



MONDO

Novaĵoj el la kongreslando

55-A UNIVERSALA KONGRESO DE
ESPERANTO

Vieno, 1-8. VIII. 1970

Alta Protektanto: **D-ro Franz Jonas**, Prezidanto de Aŭstrio.

Konstanta adreso: Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando.

Ĉarma ferioestadejo

La 11-a Internacia Infana Kongreseto, okazanta paralele kun la 55-a UK en Vieno, akceptos la esperantlingvajn infanojn en ĉarma internacia kulturejo „Hörndlwald“ (1130 Wien), kie ili disponos pri 20 ĉambretoj por 40 infanoj. Oni havos apartan domon, sed samtempe loĝos en aliaj domoj libertempantaj infanoj. Tiel la infanoj estos inter si, sed ankaŭ en la publiko. En la apudaj parkoj troviĝas grandaj ludejoj, inkluzive infanan naĝbanejon. Pro la limigita nombro de akceptotaj infanoj frua aliĝo estas konsilinda.

Filmprezentadoj dum la 55-a UK

Plenumante la deziron de multaj kongresanoj, la kongresorganizantoj enprogramigos kelkajn filmprezentadojn. Kunlige al tio ili petas ĉiujn Esperanto-instancojn, kiuj posedas prezentindan filmon kun esperantlingva teksto aŭ je konvena temo, aŭ scias pri tia, komuniki kaj proponi tion al la LKK. Samtempe oni klopodu iniciati ĉe koncernaj (turismaj, naturamikaj, komercaj ktp.) entreprenoj eldonon de novaj filmoj en la Internacia Lingvo.

Internacia Film-Konkurso

La Estraro de UEA kaj LKK de la 55-a UK anoncas internacian konkurson por filmamatoroj pri dokumenta filmo pri la 55-a UK en Vieno 1970. Formato 8 mm, daŭro maks. 30 min., laŭvole kolora aŭ nigre-blanka. Premioj ĝis 300 gld. plus filmmaterialo. Detaloj aperos en la Dua Bulteno.

ILERA fondota?

Kvankam la Internacia Ligo de Esperantistoj Radio-Amatoroj (ILERA) ankoraŭ ne estas oficiale fondita, diversaj ILERA-sekcioj sukcese agadas. La iniciatanto de ILERA, s-ro Rudolf Bartosch, kaj la aŭstra ILERA-sekcio kore invitas al fonda kunveno, kiu okazos dum la 55-a UK en Vieno. Celoj de ILERA estas i. a.

NOVAĴOJ EL POLLANDO

Varsovio. La 28-an de oktobro reprezentantoj de la Ĉefa Estraro de PEA vizitis la sidejon de la Internacia Komitato de Aŭŝvic (Auschwitz-Oswiencim) por preparoli la kunlaboron kaj kontribuon de PEA al la okazontaj venontjare solenaĵoj okaze de la 25-a datreveno de la liberigo de tiu ĉi iama hitlera mortotendaro. Oni planas traduki en Esperanton la tekston de la filmo „Arkeologio de Auschwitz“ — pri elfosaĵoj, montrantaj la martirecon de la malliberuloj, enscenigi poezianmuzikan prezentadon pri la martireco de patrinoj kaj infanoj en tiu ĉi koncentrejo kaj diskonigi la aperintan en Esperanto „Gvidlibron tra Auschwitz“.

Lodzo. Laŭ la plej freŝaj informoj la 10-a Tutpollanda Konferenco de Esperanto-Instruistoj okazos komence de 1970 en Lodjo. Laŭ la provizora programo en la konferenco oni sumigos la rezultojn de la E-instruado dum la 25-jaroj de Popola Pollando. Estos ankaŭ diskutataj la aktualaj taskoj lige kun la neceso modernigi la instruadon kaj oni fiksos laborplanon por la proksimaj jaroj. Lige kun la Konferenco de Esperanto-Instruistoj en Lodzo okazos ekspozicio de infan-desegnaĵoj, kiun aranĝis antaŭe Rondo de Junaj Esperantistoj en la Infan-domo en Gdansk.

Bjalistoko. Daŭras preparlaboroj al la II-a Kultura Festivalo de Pola Esperanto-Junularo. Oni preparas i. a. internacian konkurson de originala kaj tradukita poezio kaj prozo, konkurson por E-afiŝoj ktp. Adreso de la organizantoj: Pola Esperanto-Asocio, Bjalistoko, Pollando.

Torun. La VI-a Internacia Studenta E-Seminario, okazanta en Torun en julio 1970, ĉefe temos pri „Lenin kaj la internacia laborista movado“. La organizantoj — Studenta Scienca Esperanto-Rondo en Torun (strato Mickiewicza 6/10 DS II) — akceptos ĉiuspecan ekspozician materialon, artikolojn, fotojn ktp. lige kun la temo de la Seminario. La plej interesaj kontribuaĵoj estos premiitaj.

*El „Sciigoj el Pollando“
Pola Radio, E-Redakcio*

starigi regulan Kongresan Stacion dum la UK-oj.

TEJO kongresos en Graz

La 26-a Internacia Junulara Kongreso de TEJO okazos en aŭstra urbo Graz unu semajnon post la UK, t. e. inter la 8—15. VIII. 1970. Adreso de la LKK estas:
S-ro Heinz Kovacic, Grazbachgasse 57, A-8010-Graz, Aŭstrio.



BRONZA ZAMENHOF — TABULO EN BAD KISSINGEN (GFR)

Solena inaŭguro kun eminentaj esperantistoj

La 14-an de septembro 1969 la ĉefurbestro de la fama kuraĉloko Bad Kissingen solene inaŭguris imponan memorigan tabulon honore al d-ro Zamenhof sur la muro de la domo Bismarckstr. 22.

En ĉeesto de multaj gastoj kaj esperantistoj el^{en} kaj eksterlando la ĉefurbestro d-ro Hans Weiss, membro de la Bavara Parlamento, diris, ke la urbo Bad Kissingen volonte partoprenas en la mondvasta honorigo de d-ro Zamenhof, kiu sukcesis krei por ĉiuj homoj komunan lingvon.

La prezidanto de Germana Esperanto-Asocio, d-ro Werner Bormann, Hamburgo, elstarigis en sia festparolado la signifon de la Zamenhofa kreaĵo por la hodiaŭa tempo kaj la homan grandecon de Zamenhof. Salutojn diris ankaŭ Teo Jung, membro de la Akademio de Esperanto, veninta al Bad Kissingen, kaj d-ro Italo Chiussi, la tradukinto de la Nobla Korano, same d-ro Cagetti el la itala urbo Massa, oficiale ĝemeliginta. El Parizo estis veninta por la unaŭguro s-ino Hélène Major, ĵurnalistino kaj oficiala ekspertino pri arto. Same ĉeestis tri honoraj membroj de la E-grupo en Bad Kissingen: s-ino Lilli Katzenberger, s-ro Georg Ziegler kaj d-ro Alfred Riess, kiuj en 1911 konatiĝis kun d-ro Zamenhof en Bad Kissingen.

La tabulo havas en germana lingvo jenan tekston:

D-ro L. Zamenhof, kreinto de la Internacia Lingvo Esperanto, ĉi tie restadis kun sia familio unuafoje dum julio 1911 por kuracado.

Dankon meritas Hugo Röllinger, delegito de UEA kaj estro de la grupo, kiu faris krom la modelan kaj lertan preparon de la solenaĵo ankaŭ la gravajn teknikajn antaŭlaborojn, kies re-

zulto estas la eksterordinara varbefika^m tabulo (68×48 cm).

Aprobaj gratuloj el plej eble multaj landoj al s-ro Hugo Röllinger, Frühlingstr. 6-a, D 873 BAD KISSINGEN, favorigus pluajn lokajn sukcesojn.

PILO/T. J.

E-NOVAĴOJ EL FINNLANDO

La 54-a Universala Kongreso de Esperanto en Helsinko, okazinta fine de pasinta julio jam estas en la historio, sed ĝia efiko en la kongresa lando nur nun komencas montriĝi. Unu el la pozitivaj rezultoj estas: la membraro de UEA en Finnlando ĝis nun kreskis per preskaŭ 40%. Evidente kreskis la entuziasmo kaj la favoro al Esperanto flanke de la ĵurnalistoj.

La Kongresa Gazetara Servo (KGS) povis fari superrigardon pri nur parto de la artikoloj kaj informoj. Plej gravaj, tamen, estis la specialaj artikoloj kaj intervjuoj en la ĉefaj ĵurnaloj kaj revuoj. Dum la antaŭkongresa periodo tiuj specialaj artikoloj atingis entute longecon de 11 1/2 metroj, kaj dum la kongresa semajno aldoniĝis pliaj 21 1/2 metroj! Jen bona saltobreto por estonta informado pri Esperanto en Finnlando.

Laŭ KGS

Landa asocio havas propran jarlibron

La aliĝinta landa asocio de UEA en Britujo, Brita Esperantista Asocio, ĵus eldonis propran jarlibron por 1970 sub la titolo „Handbook 1970“. Ĝi donas en landa kadro tion, kion donas sur monda nivelo la Jarlibro de UEA. Unuavice, tamen, ĝi celas doni al novaj membroj de BEA kaj al novaj interesitoj utilajn konsilojn. Ĝuste por interesigi novajn lernantojn ĝi estas redaktita en angla lingvo kaj la titoloj de la diversaj sekcioj sufiĉe klarigas ĝian enhavon: „Lerni kaj progresi“; „Kiel kontakti aliajn“; „Listo de lokaj reprezentantoj“; „Librolisto“ ktp. Pluraj pagitaj anoncoj subvenciis la eldonon. Simila eldonaĵo sendube estus bonvena ankaŭ ĉe aliaj landaj movadoj.

La redakcio de „Bulgara Esperantisto“ gratulas la Novan Jaron al siaj multnombraj legantoj en kaj ekster nia lando kaj bondeziras al ili sanon, sukcesojn kaj feliĉon!

Jaroslavl, 9. IX. 1969

Estimata redaktoro,

Antaŭ nelonge mi en unu Esperanta revuo renkontis tri konatajn nomojn de esperantistoj. La redakcio de la revuo helpis al mi trovi tiujn miajn konatulojn, pro kio mi kore dankas ĝin. La konatuloj (hungaroj), kiujn mi ne vidis kaj pri kiuj mi sciis nenion dum preskaŭ 50 jaroj, sendis al mi tre bonajn ĝojigajn leterojn. En ili mi trovis la liniojn, kiujn presigi en via revuo mi opinias utila. Ili tre bone montras la signifon de Esperanto kiel vera ligilo inter la popoloj, vivanta kaj progresanta spite al ĉiuj profetaĵoj de „praktikaj homoj“.

Mi opinias, ke artikoloj kiel „Senduba vero“ de Zora Mladenova Hans, presita en „B. E“ n-ro 11/968, estas tre trafaj kaj utilaj.

El la unua letero :

Kara mia malnova kaj nedelonge denove retrovita amiko kaj samideano,

Vi malfacile povas imagi, kiel mi ekĝojis, eksciante, ke vi ankoraŭ vivas kaj fartas bone, ke vi ne forgesis nin, viajn malnovajn konatulojn. Senpacience mi atendas viajn informojn.

Depost nia konatiĝo forpasis jam 50 jaroj.

El la dua letero :

„Bone estas nun rememori tiujn malfacilajn, sed heroecajn tagojn kaj retrovi malnovajn amikojn. Estas kvazaŭ renaskiĝo, kvazaŭ oni reaperas en tiun mondon, kie kaj kiam oni estis junaj.

Por mi la lingvo Esperanto estas same kara kaj amata, kiel la gepatra lingvo, ĉar pere de ĝi mi ekkonis mian edzinon... nia familia lingvo estis Esperanto. Pasis 40 jaroj de kiam ŝi mortis, sed la memoro kaj Esperanto eĉ nun kunligas nin“.

El la tria letero :]

„Mia tre kara amiko!

Mi kun granda ĝojo ricevis vian leteron, per kiu mi vigle rememoris mian Junecon, la tempon, en kiu spite al ĉiuj malfacilaĵoj mi estis feliĉa, ĉar en la granda fremda lando mi havis amasan familian rondon, bonegajn amikojn, kiajn eĉ en mia patrolando mi ne havis — kaj ĉio pere de Esperanto. Jes, kara samideano, multaj eĉ ne povas imagi, kiom grava povas esti la komuna lingvo kun komuna sento, komuna ideo. Tiuj, kiuj rigardas nur la materialan utilon, forgesas, ke animo bonhava povas esti pli granda trezoro, kiun oni ne povas taksi kaj mezuri per mono. Precipe min ligas al la Internacia Lingvo tiuj memoroj kaj karaj animsentoj, ke mi neniam povis forlasi ĝin, fariĝi nedankemulo.“

Ni Zecenzas.

LA GERMANA DEMOKRATIA RESPUBLIKO SIN PREZENTAS

La 7-an de oktobro ĉi-jare la popolo de GDR kune kun siaj amikoj tra la mondo festis la 20-an datrevenon de la fondiĝo de Germana Demokratia Respubliko — la unua ŝtato de laboristoj kaj vilaĝanoj sur germana teritorio.

La fondiĝo de GDR estis grandega sukceso por la germana popolo. Primokita, blasfemita kaj malŝatita de la malamikoj de l'progreso, kiuj en la unuaj jaroj post ĝia fondiĝo profetis ĉiutage ĝian tutcertan fiaskon, kaj bonvenigita, estimata kaj defendata de siaj amikoj, GDR dum la 20 jaroj de sia ekzistado evoluis al floranta, vivoforta socialisma ŝtato kaj al decida faktoro por konservado de la paco en Eŭropo kaj en la mondo kaj por la tuteŭropa sekureco. Hodiaŭ sen GDR jam ne estas eble solvi kiun ajn gravan eŭropan problemon, ĝi ne povas esti maprespektata kaj ignorata, ne povas esti subminita kaj deŝirita el la tuto de socialismaj landoj.

Pri la grandiozaj sukcesoj kaj transformoj, kiujn realigis GDR per la kreopovo kaj la lerteco de siaj civitanoj sub la prudenta gvidado de Socialista Unueca Partio de Germanio, parolas la belaspekta esperantlingva libro „Germana Demokratia Respubliko — bildoj kaj faktoj“¹.

La libro per siaj 11 ĉapitroj, multnombraj belaj koloraj kaj nigra-blankaj fotoj, mapoj kaj diagramoj liveras plej necesajn informojn pri la lando, pri ĝia popolo, historio, socia vivo, ekstera politiko, ekonomio, popola klerigo, sanprotektado kaj socialaj aferoj, kultura vivo, ripozado kaj sporto. Aparta ĉapitro donas mallongan karakterizon pri la 15 distriktoj de GDR evidentigante ĉies ekonomian signifon. Tiamaniere la libro ebligas al la fremdlanda leganto akiri sufiĉe plenan imagon pri GDR. Pro tio oni povus karakterizi ĝin kiel gvidlibron pri GDR.

La esperanta lingvaĵo de la libro estas preskaŭ senripoĉa. La prezento estas facile komprenebla. La uzitaj terminoj estas trafaj. Entute la libro estas interesa kaj utila legaĵo kaj ĝia eldono estas laŭdinda manifestaĵo de la esperantistoj en GDR. Niajn gratulojn!

D. H.

¹ La libro estas eldonita de la Libroeldonejo „Zeit im Bild“ en Dresden en 1969, 256 paĝoj, mezformata, prezo 6,90 markoj.

Noto de Red. La libro estas senpage havebla je adreso: Centra Laborrondo Esperanto de GDR, Charlottenstr. 60, 108 Berlin.

POR LA MALGRANDAJ ESPERANTISTOJ

NOVJARO

Teksto: Vesa Paspaleeva

Muziko: Ffisto Nedjalkov

Vigle

Per ru-ĝaj jam bo-te-toj fra-pe-tas. A-vo
Frost': „Mi ve-nas, gaj-u-le-toj, kun kor-bo sur la
dors'. Per dors' Do-na-coj es-tas, ka
raj, por ĉi: uj. vi el kor'! En
ĉi ves-per' nov-ja-ra: ek-, kàn-tu
vi en hor' Da — hor'!

Per ruĝaj jam botetoj
frapetas avo Frost':
— Mi venas gajuletoj,
kun korbo sur la dors'

Refreno:

Donacoj estos, karaj,
por ĉiuj vi el kor'.
En ĉi-vesper' novjara
ekkantu vi en hor'!

En ĝin vi rigardetu —
donacoj estas nur:
pajacoj kaj ursetoj,
simioj kaj tambur'.

Por Elka estas libro,
Por Spas akordion'.
La koko donas signon:
— Mi estas por Anton!

Tradukis Ljudmila Paspaleeva

4. **ESPERANTO** — LINGVA ŜLOSILO

Lastatempe la vortoj estas veraj internaciaj migrantoj. Ili penetras preskaŭ ĉiujn naciajn lingvojn. Precipe multaj fremdaj vortoj estas uzataj de la nacioj, kiuj ekiras novan vojon post sia liberiĝo el fremda jugo. La kreinto de Esperanto d-ro L. L. Zamenhof tre bone sentis la internaciecon de la vortoj, kiuj cirkuladas tra la tuta mondo. Li metis kiel solidan bazon de sia kreaĵo ĝuste tiujn vortojn, kiujn la popoloj uzas ĉiutage en siaj kontaktoj.

Nia bulgara lingvo ankaŭ ne faras escepton. En ĝi estas multaj fremdaj vortoj. La bulgara popolo uzas ilin, ili estas ĝia lingva riĉaĵo, ekzemple la vortoj: advokato, teatro, salono, koridoro, portreto kaj ankoraŭ centoj da similaj vortoj. Nia popolo bulgarigis ilin.

Tamen estas ankaŭ aliaj fremdaj vortoj en nia lingvo, kies apartajn radikojn bulgaroj ordinare ne komprenas en la fremda lingvo. Ekzemple *гардеоб*. Tiu ĉi vorto konsistas el la franclingvaj radikoj *gard* kaj *rob*, do la kunmetaĵo signifas „gardi robojn“. Ĉiu esperantisto bone komprenas tion. Aŭ la vorto *портмоне* — ĝi signifas „objekto, en kiu oni portas monon“. La vorto *бакулвер* signifas, ke „pulvoro helpas bakaĉon“ ktp.

Tiaj kunmetitaj vortoj kun fremda origino estas multaj en nia ĉiutaga bulgara lingvo. Ni uzas ilin mekanike, ne sciante ilian fremdan signifon.

Krome estas vortoj, kiujn bulgaroj uzas kun sufiksoj, konataj al ni kiel esperantistoj:

a) vortoj kun sufikso *ist*: maŝinisto, telegrafisto, komunisto, darvinisto, turisto, esperantisto k. m. a.

b) vortoj kun sufikso *aĵ*: baraĵo, raportaĵo, pakaĵo, muntaĵo, kaptaĵo, trikotaĵo k. a.

c) vortoj kun sufikso *ism*: kapitalismo, socialismo ktp.

d) vortoj kun sufikso *et*: brikejo (de la radikoj briko), libreto k. a.

e) vortoj kun prefikso *re*: reprodukti, reorganizi, reformi, reciti ktp.

Dank' al Esperanto oni povas pli facile kompreni la signifon de multaj fremdaj vortoj, kiuj cirkuladas en nia ĉiutaga parolado. Supre mi donis nur kelkajn ekzemplojn. Filologoj kaj lingvistoj povus profunde kaj vaste esplori la problemon kaj publikigi interesan kaj utilan materialon.

Georgi Simeonov, Vidin

HOTELOJ POR ESPERANTISTOJ

Ofte esperantistoj, kiuj vizitas iun loĝlokon por kelkaj tagoj, devas mendi litojn en hotelo. Se ili pli ofte loĝas en unu kaj sama hotelo, tio estas tuj rimarkata de la oficistoj, kiuj rapide konvinkigas, ke estas uti-

le por ilia laboro scipovi la Internacian Lingvon. En Sofio ekde 1969 j. ni rekomendas al ĉiuj esperantistoj, kiuj venas Sofion el la provinco aŭ el eksterlando, loĝi en hotelo „Vi-toŝa“, str. „Iskâr“ 9. Ĝis nun ni loĝigis tie aŭstrojn, francojn, hungarojn, polojn kaj germanojn. En la akceptejo de la hotelo sur tablojn ni ofte metas Esperanto-propagandilojn aŭ turismajn prospektojn, en kiuj estas indikita la adreso de la Turista Sekcio „Esperanto“. Tiu ĉi nia agado estis rimarkita de la administrantoj en la hotelo. Multaj el ili jam persone konas la fakdelegiton de UEA pri turismo kaj klopodas kontentigi liajn postulojn por pli bone situanta aŭ pli malmultekosta ĉambro. Kelkaj el ili jam lernis Esperanton.

Mi opinias, ke estas bone, se en la Jarlibro de UEA aperus adresoj de rekomenditaj hoteloj por esperantistoj. Nature, tio rilatas nur al urboj, en kiuj estas po kelke da hoteloj. Tiamaniere la Jarlibro fariĝos pli necesa helpilo por la esperantistoj.

La Turistaj Servoj de la landaj E-organizaĵoj povas fari adresarojn de hoteloj, kampadejoj, restoracioj kaj magazenoj, kiujn rekomendos al la esperantistoj pro tio, ke en ili deĵoras esperantistoj aŭ por propagando de Esperanto. En Bulgario ni kompilas tian adresaron.

Ni deziras havi kontakton kun E-societoj kaj aktivuloj, kiuj aktive laboras por enkonduko de Esperanto en la turismon, por interŝanĝi sperton tiurilate. Bonvolu skribi al: Esperanto-Turismo, P. K. 45, Sofio, Bulgario.

Nik. Nikolo

Distroĵ

Ĉi-sube ni donas al niaj legantoj humoraĵon de la granda eksplodigisto de la rido en Esperantujo Raymond Schwartz (Rajmon Ŝvarc).

PRELEGO PRI FUNDAMENTAJ ELEMENTOJ DE ESPERANTO

Gesinjoroj! Iun aŭ alian tagon ĉiu el vi fariĝos akademiano. Tiam ne estos senutile koni la plej kaŝitajn sekretojn de nia lingvo. Kaj tiel ni decidis malkaŝi antaŭ vi tiujn mirindaĵojn. Bonvolu nin sekvi.

Kompreneble, ni komencos per la komenco, t. e. per la alfabeto. Gesinjoroj! La Esperanta alfabeto estas stranga fenomeno. La plej sagacaj sciencistoj ne scias ekzakte, al kiu fakto la alfabeto apartenas.

Multaj kalkulas ĝin inter la legomoj. Ili pretendas, ke ĝi estas el la familio de la betoj, ja ĝia nomo estas: alfa beto. Aŭ ili pedante ĝin subordigas al malgranda fabo, t. e. al fa-

beto. Ni, kontraŭe, asertas, ke la alfabeto ne apartenas al la legomoj, sed al la homoj, kiuj legas. Ĝi apartenas al la... leg-homoj, ĉu vi kaptis la nuancon?

Lastatempe oni renkontas ankaŭ modernajn filologojn, kiuj klasifikas la alfabeton inter meblaro.

Laŭ ili, la alfabeto estas meblo, ĉar ĝi estas lito, konsistanta el 28 lit-eroj. Ĝi estas tuta meblaro, ĉar efektive per simpla kunmeto de diversaj literoj oni konstruas plej diversajn meblojn. Ekzemple:

k—m—d=komodo;

s—f=sofo, kaj tiel plu.

Tiu klasifiko ŝajnas akceptebla.

El la diritaj 28 literoj oni iom post iom kunmetis vortojn, formis frazojn, produktis librojn.

Estas preskaŭ nekredeble, kiom da volumoj oni sukcesis plenigi per tiuj kelkaj literoj.

Se oni metus unu sur la alian ĉiujn librojn ĝis nun verkitajn, oni havus turon miloble pli altan ol la Babela. Kaj tiu turo, konsistanta el nur malmultaj literoj, fakte ekzistas. Oni nomas ĝin Litera Turo!

Elĉerpinte tiel ĝisfunde la sekretojn de l' alfabeto, ni nun parolos pri la proksima paraĝo: la artikolo. Estus insulto klarigi al vi, kio estas artikolo. Artikoloj troviĝas en ĉiuj gazetoj. La plej mallongaj ĝenerale estas la plej bonaj.

Tiurilate ankaŭ ni rememorigu la saĝan konsilon de nia „Fundamento“, kiu, bedaŭrinde, ne estas sufiĉe atentata:

„La personoj, por kiuj la fuŝado de artikolo prezentas malfacilaĵojn, povas en la nuna tempo tute ĝin ne fuŝi.“

(„Fundamento“, par. 1)

Kaj nun, gesinjoroj, antaŭ ol fini, ankoraŭ kelkajn vortojn pri la kazoj.

La kazoj estas la formoj de la deklinacio. Sed ne konkludu, ke „kazo“ estas sinonimo de „formo“. Neniam diru: „Tiu fraŭlino havas agrablajn kazojn“. Ĉar, kiam vi interesiĝas pri la fraŭlino, tio koncernas ne la kazon, sed la kason! Ĉu vi kaptis la nuancon? En Esperanto ekzistas nur du kazoj: nominativo kaj akuzativo. Erare kelkaj soifuloj aldonas la „aperitivon“*. La aperitivo ne estas kazo, sed nur okazo, jes, okazo por trinki. Kaj tiun ĉi okazon, gesinjoroj, mi volonte profitos...

* „aperitivo“ — antaŭmanĝa trinkaĵo, laŭdire apetitiga, pri kies populareco en Francujo kaj en aliaj landoj civilizitaj la aŭtoro ne rajtas plendi.

Ĉefredaktoro: Kunĉo VALEV

Redakta Komitato: Tatjana EVSTRATIEVA, Atanas LAKOV, Venelin MITEV, Ivan SARAFOV, Simeon D. SIMEONOV, Petr TODOROV.

Korektis: Vasja Petrova

Sofio, poŝtkesto 66

Tel. 83-26-82

VORTENIGMO

1	D	I	U	R	E	O
2	R	A	P	I	D	E
3	A	P	R	I	L	O
4	L	U	D	I	L	O
5	R	I	Ĉ	U	L	O
6	B	A	R	E	L	O
7	N					
8	O	N	D	E	G	O
9	A	S	O	C	I	O
10	M	A	L	V	E	R
11	K	I	N	E	J	O
12	P	L	I	S	K	A
13	P	E	N	T	R	I
14	D	O	L	O	R	O
15	P	A	N	E	R	O

Horizontale skribu la necesajn vortojn. Laŭ la signita voĵeto al vi venos gratulo de „Bulgara Esperantisto“.

1. Horaro. 2. Iri de unu loko al alia dum mallonga tempo. 3. Monato. 4. Per ĝi ludas la infano. 5. Riĉa homo. 6. La loĝejo de Diogeno. 7. Nomo de granda bulgara poeto. 8. Tre granda ondo. 9. Unuiĝo. 10. La kontraŭo de vero (sen finaĵo). 11. Tie oni spektas filmojn. 12. Historia loko en nia lando. 13. Reprezentation per linioj kaj koloroj. 14. Kion vi sentas, kiam io pikas vin? 15. Eta parteto de pano.

Zdravko Conev



Georgi Dobrev — Ruse. Kara samideano² admirindaj estas la obstineco kaj la entuziasmo, kun kiuj vi tradukas poeziaĵojn de la maŝinkonstruistoj el uzino „G. Dimitrov“. La plimulto el ili, kion ni vidas de viaj tradukoj, estas enhavoriĉaj, interesaj. En nia revuo tamen — krom originala poezio — ni publikigas tradukitajn versaĵojn nur de klasikuloj aŭ de jam vaste konataj, karakterizaj nuntempaj aŭtoroj, kiuj prezentas intereson ankaŭ por niaj samideanoj en eksterlando. Krom tio vi tradukas tre ofte laŭvorte. Legu la klasikulojn de la Esperanto-poezio kaj tradukojn de niaj plej bonaj tradukistoj en Esperanton.

Provu traduki unue popolkantojn, kiuj ne estas rimitaj kaj kies ritmo estas pli libera. Ni atendas de vi novajn leterojn kun tradukoj kaj interesajn originalajn poemojn.

TRA LA GAZETARO

En ĵ. „**Iskra**“ (14. VI. 1969) — artikolo de Iv. Zaĥarijev — „Vigliĝo inter la geesperantistoj de Kazanlâk“; al ili gastis esperantisto el Svedlando.

En ĵ. „**Narodna Kultura**“ (2. VIII. 1969) — artikolo de Neli Abaĝieva „Letero al Hiroŝima“, en kiu la aŭtorino mencias la esperantan emblemon.

En ĵ. „**Sevlievska Tribuna**“, (2. VIII. 1969) — artikolo de Ilija Iljĉev — „Esperantistoj-aktivaj partoprenintoj en la batalo“ (rememoroj).

En ĵ. „**Rabotniĉesko Delo**“ (16. VIII. 1969) — informo „Rondira panoramvojo“, en kiu oni mencias la kontribuon de la Internacia Esperantista Brigado por la konstruo de la vojo ĉirkaŭ urbo Loveĉ.

En la sama ĵurnalo (22. VIII. 1969) — informo „Internacia renkontiĝo de esperantistoj“ (pri la E-kursoj en Pamporovo).

En ĵ. „**Septemvri**“ (16. VIII. 1969) — informo de Simeon Baltaĝiev — „40 jarojn E-Societo Paco“ (en urbo Bjala).

En ĵ. „**Naroden Drugar**“ — Jambol (30. VIII. 1969): artikolo de Konstantin Kavariĝikov „Geesperantistoj el Jambol gaste en Hungario“.

En ĵ. „**Literaturen Front**“ (4. IX. 1969) en la skizo „Malkata Rusijka“ („La malgranda Rusio“) la aŭtoro Canko Ĵivkov mencias la agadon de la E-Societo en vilaĝo Kableŝkovo, regiono de Burgas.

En ĵ. „**Ŝumenska Zarja**“ (13. IX. 1969) en informo „Niaj amikoj nin gratulas“ oni publikigas gratulleterojn de esperantistoj el USSR, GDR, Nov-Zelando.

En ĵ. „**Narodno Delo**“ — Varna (2. IX. 1969) — informo de Ĵ. Delĉev „Kurso de Esperanto por junaj geinstruistoj“ (kursgvidanto docento Georgi Dimov).

En la sama ĵurnalo (9. X. 1969) — sciigo en la kroniko pri prelego en Esperanto de D. Dimov — „Impresoj pri Nederlando“.

En la sama ĵurnalo (10. X. 1969) — sciigo en la kroniko pri kursoj de Esperanto.

En la sama ĵurnalo (14. X. 1969) — sciigo en la kroniko pri malfermo de E-kurso por komencantoj.

En ĵ. „**Narodna Mladej**“ (12. X. 1969) — artikolo de Petr Terzijski „La revo de Bojan Ĉonos“ (oni mencias, ke li uzis Esperanton-rusan vortaron).

En ĵ. „**Veĉerni Novini**“ (17. X. 1969) — informo de P. Tarasenko „Antaŭ la junulara E-Festivalo“.

En ĵ. „**Oteĉestven Zov**“ — Vraca (18. X. 1969) — informo „Aŭtografo de la kosmonaŭto Eliseev“ kun bildo de la kosmonaŭto kaj la konata esperantisto el Vraca Bojĉo Mladenov.

NEKROLOGOJ

La 5-an de novembro j. k. subite forpasis en urbo Dve Mogili la elstara esperantisto

D-ro ZAĤARI BOĈEV

membro de CK de BEA. Esperantisto de sia junaĝo, li dum la tuta sia vivo labcris sindone por la triumfo de nia kara lingvo Esperanto

La 7-an de novembro en Stanke Dimitrov forpasis, en sia 63-a jaraĝo nia s-ano

BANO IV. BANO V

fondinto de E-Societo „Marek“ kaj ĝia prezidanto lastatempe, kiu aktive laboris por Esperanto dum sia tuta vivo.

Ni kondolencas al ambaŭ funebrantaj familioj kaj gesamideanoj!

